Germana Esperantisto

Der Deutsche Esperantist

Aperas duonmonate en du alternantaj eldonoj: **Eldono A (Propagando), Eldono B (Literaturo).** — **Abonprezo por jaro:** por Germanujo 2,— Sm, (por eksterlando 2,250 Sm). Unu eldono aparte: 1,— Sm (1,125 Sm). — Provabonoj por ka endara kvaronjaro 0,250 Sm (0,300 Sm) por unu eldono.



Erscheint halbmonatlich in zwei abwechselnden Ausgaben **Ausgabe A (Propaganda), Ausgabe B (Literatur).** — **Bezugspreis für ein Jahr:** für Deutschland 4,— M., (für das Ausland 4,50 M.). Jede Ausgabe einzeln: 2,— M. (2,25 M.). — Probeabonnements für ein Kalenderquartal 0,50 M. (0,60 M.) für jede Ausgabe.

Anoncoj: Vidu tarifon sur la kovrilo. — **Anzeigen:** Siehe Tarif auf dem Umschlag.

Alsenditajn artikolojn la redakcio laŭ bezono korektas. Nepresitajn manuskriptojn ni redonas nur, se oni aldonis poŝtmarkon por la resendo.

9ª Jaro No. 4 A | Redakcio kaj Eldonejo: Berlin SW. 68, Lindenstr. 18/19 | Aprilo 1912

Enhavo:

Abstimmungen auf schriftlichem Wege.

Ein idealer Zustand wäre es, wenn die Esperantogruppen auf gemeinsame Kosten ihre Delegierten zu den Ligen- und Bundestagen sowie zu den internationalen Kongressen entsenden könnten. Doch so weit sind wir noch nicht. Nur in den wenigsten Fällen wird die eine oder andere Gruppenkasse es gestatten, den Delegierten mit Reisemitteln auszustatten, so dass die Vertretung der Gruppen meist der Opferfreudigkeit eines Mitgliedes zu verdanken ist.

Demgemäss geben die Beschlüsse der Kongresse nur im günstigen oder selbstverständlichen Falle die Meinung der Mehrheit kund. Schon deshalb muss ein Weg geschaffen werden, der es ermöglicht, dass die Satzungen es zulassen, eine den Kongressen vorangehende oder nachfolgende schriftliche Abstimmung über die wichtigsten Punkte zu fassen. Zu diesen wichtigen Punkten zähle ich: Wahlen des Vorstandes, des Beirats, des Kongressortes, des Bundesorgans, Bestimmungen über Beitragshöhe oder über Vertretung von grundlegenden Ansichten bei den internationalen Kongressen, sowie Vorschläge zum *Lingva Komitato* oder anderen internationalen Organisationen.

Mit der schriftlichen Abstimmung sind wesentliche Vorteile verbunden, sowohl für die Leitung des Bundes als auch für die Gruppen.

Majoritätsbeschlüsse schützen den Vorstand vor unberechtigten Vorwürfen, und die Gruppen können auf diese Weise Leitsätze für die Verwaltung des Bundes aufstellen. Einen weiteren wesentlichen Vorteil der schriftlichen Abstimmung erblicke ich darin, dass die Gruppen durch die Vorschläge zur Abgabe ihrer Stimme die Zeitungen mit Aufmerksamkeit lesen und über den Gegenstand der Stimmabgabe orientiert werden, und so sicherlich in weit höherem Massstabe als bisher an der Entwicklung des Bundes Interesse nehmen. Ein Beiseitestehen, wie wir dies leider oft besonders bei nicht aktiv oder ordnungsgemäss geleiteten Gruppen, ob gross oder klein, beobachten mussten, wird herabgemindert, und dem Bunde fernstehende Gruppen werden dadurch voraussichtlich zum Beitritt veranlasst. Der Eingang der Beiträge wird infolge des damit verbundenen Stimmrechts gefördert werden, und ein regeres Leben wird sich höchstwahrscheinlich entwickeln.

Mit der Stimmabgabe und deren Kontrolle ist naturgemäss ein grösserer Arbeitsaufwand verbunden, doch glauben wir geeignete Kräfte, die sich ehrenamtlich hierzu bereit erklären, zu finden. Ein Versuch um die Ausführbarkeit dieses Planes wird sich zweifellos lohnen.

Eine günstige Gelegenheit bietet sich zurzeit hierzu.

Unser Beiratsmitglied, Herr W. A. Vogler, ist kürzlich durch den Tod aus dem Beirat ausgeschieden. Satzungsgemäss kann der Beirat auf Verlangen sich selbst ergänzen, während die Neuwahl für die alle Jahre zu 1/3 ausscheidenden Beiratsmitglieder (1912 = 8 Mitglieder) beim Kongress zu erfolgen hat.

Die Satzungen lassen also zu, dass die Vakanz des durch Herrn Voglers Tod freigewordenen Postens auch auf andere Weise als durch Zuwahl seitens des Beirats ausgefüllt wird. Bekanntlich ist von zwei Seiten der Vorschlag gemacht worden, dass Beiratswahlen auf eine mehr demokratische

Weise als bisher geschehen möchten, und der *Sächsische Landesverband Esperanto* hat bei seiner jüngsten Tagung beschlossen, einer schriftlichen Wahl von Beiratsmitgliedern zuzustimmen.

Mein diesmaliger Vorschlag geht also dahin, den Ersatzmann für Herrn Vogler schriftlich zu wählen. Demgemäss bitte ich um Nennung von Kandidaten (wenn möglich unter Zusicherung, dass dieselben eine auf sie fallende Wahl annehmen würden).

Die mir bekanntgegebenen Wahlen werde ich in den Zeitschriften „La Esperantisto", „Germana Esperantisto" (Mai-A) und „Germana Esperanto-Gazeto" veröffentlichen. Ich bitte also um baldigste Einsendung der Vorschläge, damit die vorgeschlagenen Kandidaten zur Wahl gestellt werden können. Zur Kontrolle der abgegebenen Stimmen werde ich je 2 Vertreter von jeder in Dresden ansässigen Bundesgruppe in den Tagen vom 10. bis 15. Mai einladen und das Resultat veröffentlichen.

Da das Verfahren nur eine Probe auf die Ausführbarkeit sein soll, sind bindende Konsequenzen bis zum Kongressbeschluss mit dieser Stimmabgabe nicht verbunden. Ich zweifle aber nicht daran, dass Vorstand und Beirat den in der vorgeschlagenen Weise gewählten Kandidaten sofort in den Beirat aufnehmen werden.

K. von Frenckell,

p. Adr. Ressort V (Personalien) d. Deutsch. Esp.-B., Hauptstr. 38, Dresden.

La demando pri internacia organizo.

I. La nuna stato de la demando.

Jam baldaŭ post la publikigo de Esperanto, nia Majstro forte deziris la kreadon de internacia organizo de la esperantistaro, precipe por propagandaj celoj. Dro Zamenhof prave konsciis, ke ne sufiĉas la rekomendo de nia lingvo kvazaŭ de buŝo al buŝo, sed ke ĝi devas havi fortan apogilon en formo de bone bazita organizo, kiu povas preni sur sin la efikan propagandon por nia lingvo en ĉiuj societaj rondoj kaj fine prezenti ĝin al la registaroj por oficiala enkonduko. Pro tio li jam antaŭ longe ellaboris detalan projekton por *Tutmonda Ligo Esperantista,* kiun li volis antaŭmeti la Unuan Kongreson en Boulogne s. M. Sed, pro diversaj kaŭzoj kaj kontraŭdiroj, tiu plano ne estis plene efektivigata. Kelkajn proponojn, kiujn Dro Zamenhof faris en sia projekto, ekz. pri *Lingva Komitato, Kongresa Komitato* k. a. oni ja akceptis kaj fondis la koncernajn komitatojn; nur la ĝenerala organizo restis nesolvita demando.

De post tiu tempo, sed precipe dum la lastaj jaroj, la demando pri organizado de la tutmonda esperantistaro okupis konstantan rubrikon en nia gazetaro. Intertempe, dum la Kvara Kongreso en Dresden, ja fondiĝis nia *Universala Esperanto-Asocio,* sed ĝi ne solvis per siaj antaŭfiksitaj taskoj la problemon de nura propaganda organizaĵo. Sed pri tio mi poste parolos. Nur la Kvina Kongreso en Barcelona faris sufiĉe taŭgan proponon pri la *Internacia Konsilantaro* kaj esprimis la deziron pri kreado de tia institucio. Kvankam la agado de la Internacia Konsilantaro unue estis limigita je la zorgo pri la financaj rimedoj de niaj internaciaj institucioj, ĝi tamen estis la komenco de la granda organizaĵo, nepre necesa por la disvastigo kaj oficialigo de nia lingvo. La Sesa Kongreso en Washington jam iom plivastigis la taskojn de la Internacia Konsilantaro, esprimante la deziron, ke estas necese, ke la I. K. faciligu amikajn interrilatojn inter la propagandaj asocioj por la celo de komuna propagando.

Post la Sesa Kongreso la I. K. eklaboris laŭ la proponita direkto, kaj ĝia anaro kreskis per aliĝo de reprezentantoj el multaj naciaj asocioj. Tamen la tiama stato de la I. K. ne povis esti definitiva, ĉar la institucio ankoraŭ havis senteblajn mankojn, kiuj malhelpis ĝian vere efikan agadon sur la vasta kampo de internacia propagando. Tion ekkoninte, kelkaj eminentaj propagandistoj faris novajn proponojn, antaŭmetotajn al la Sepa Kongreso en Antwerpen. Ankaŭ Dro Zamenhof faris organizan proponon; sed ĝi koncernis nur la organizon de niaj internaciaj kongresoj kaj ne la tutmondan organizon esperantistan. Nia Majstro deziris, ke la oficialaj kunsidoj de la kongresoj konsistu el rajtigitaj reprezentantoj, kiuj en la nomo de la esperantistaro povas decide voĉdoni pri la proponoj aŭ aferoj, prezentitaj al la kongresoj, anstataŭ la ĝis tiam nur ebla maniero de deziresprimoj, ofte ne plenumitaj. Bedaŭrinde multaj samideanoj intermiksis la ĵus montritajn aferojn, kiuj estis tute sendependaj unu de la alia, kaj tiel ekestis granda konfuzo, kiu sin plej evidente montris en la kolonoj de nia gazetaro. Kiel jam antaŭe, oni de certa flanko nun ankoraŭ pli energie kontraŭbatalis la ideon pri organizo internacia, kaj la tuta projekto, eĉ la supre citita propono de Dro Zamenhof estis en danĝero.

Tiel staris la demando ĝis antaŭ la Sepa, sed en la kongreso montriĝis, ke la bono ne pereas. Aŭdinte la klarigojn de nia Majstro, la jam agantaj Rajtigitaj Delegitoj akceptis unue la regularon de li proponitan, kaj due ankaŭ la proponon pri internacia reprezentantaro. Samtempe oni elektis specialan komision, kiu devas detale esplori la lastan aferon kaj fari taŭgan proponon

por internacia organizo al la Oka Kongreso en Krakovo, kiu definitive voĉdonos pri la demando*).

Sed kiu pensis, ke la diskuto pri internacia organizo finiĝis per la preskaŭ unuanima akcepto de la propono, tiu evidente eraris; ĝi komenciĝis denove, eĉ kun pli granda forto, kaj ĝi ofte atingis nekompreneblan gradon de fanatikeco. Jam en la kongresa kunsido estis kelkaj samideanoj, kiuj akre kontraŭstaris la projekton pro diversaj motivoj. Ili ne kontentiĝis pri la decido de la kongreso, sed komencis polemikon pri la afero en diversaj gazetoj. Tiu polemiko ĝis nun ne nur ne estas finita, sed ŝajnas fariĝi pli kaj pli vigla kaj bedaŭrinde ankaŭ pli akra. La lastan mi devas kun bedaŭro konstati pri *Le Monde Espérantiste*, kiu ne plu objektive pritraktas la temon; ĝi emplikas en la aferon kaj sisteme atakas personojn, kiuj akiris grandajn meritojn kiel senlacaj kaj oferemaj pioniroj de Esperanto. Efektive, pri tia malnobla agadmaniero devas indigni ĉiu juste pensanta samideano, kaj mi estas konvinkita, ke ĝi trovos la meritіtan kondamnon inter nia anaro. Sub la ŝajnigo de fidelaj fundamentistoj, la aŭtoroj de M. E., inter kiuj sin precipe distingas S-ro Lamant, predikas en siaj artikoloj revolucion kontraŭ la nova institucio. Por ke ĝi ne estu realigota, S-ro Lamant eĉ proponas, aŭ ne iri Krakovon aŭ nur sub certaj kondiĉoj antaŭe garantiitaj. Ĉu tio ne estas ridinda? S-ro L. mem nomas la malplimultanojn en la voĉdonado de la lasta kongreso „blekantoj“; ŝajnas al mi, ke li por certaj kunlaborantoj de M. E. trovis la ĝustan esprimon, kaj ke estas plej bone, sin ne okupi pri ilia „blekado“.

En kelkaj aliaj gazetoj, ekz. *Lingvo Internacia, Danubo, Ondo de Esperanto, Pola Esperantisto, Germana Esperanto-Gazeto* k. a., la demando pri internacia reprezentantaro ankaŭ estis kaj estas diskutata. Tiuj ĉi artikoloj almenaŭ estas legindaj, ĉar iliaj aŭtoroj trankvile esprimas sian opinion por aŭ kontraŭ la afero. Atentindaj ankaŭ estas la artikoloj, kiujn S-ro Hodler, la direktoro de U. E. A., publikigis en sia organo *Esperanto* kontraŭ la nova organizo**).

Jam en la kunsido de la Sepa, en kiu la demando pri internacia reprezentantaro estis priparolata, S-ro Hodler energie kontraŭstaris la projekton. Videble li timis la „novan konkuranton“ de sia asocio, kaj por fari ĉi tiun konkuranton kiel eble plej sendanĝera, li volas „engluti“ ĝin*); pro tio li proponis aligi la novan institucion kiel specialan fakon al U. E. A. Sed li ne sukcesis. Kvankam U. E. A. sur sia speciala kampo bonege laboras, la esperantistaro ne volas konfidi al ĝi la administradon de la internacia reprezentantaro, kiu ja entute havas aliajn celojn, ol U. E. A. La samajn ideojn, kiel en Antwerpen, S-ro Hodler esprimas en siaj antaŭe cititaj kontraŭartikoloj, kaj samtempe li faras proponojn, kiamaniere lia ideo pri aligo al U. E. A. povus esti efektivigota.

Kiel oni vidas, ekzistas du partioj inter la kontraŭuloj de propaganda organizaĵo internacia: unu estas senkondiĉe kontraŭ tia organizo, kaj la alia principe aprobas ĝin, sed deziras ĝian aligon al U. E. A. Povas esti, ke ambaŭ partioj, kiuj intense varbas adeptojn por sia ideo, en Krakovo frate voĉdonos kontraŭ la tuta afero, por tiamaniere atingi la komunan celon: malebligi la starigon de „poresperanta“ organizaĵo. Tial ŝajnas al mi necese, iom esplori la kontraŭdirojn de ambaŭ partioj, por informi tiujn samideanojn, kiuj ĝis nun restis neŭtralaj al la demando pri internacia organizo. Tion mi faros en sekvonta artikolo. Mi provos malpravigi la opinion de la „neorganizemaj liberuloj“, kaj mi esperas, ankaŭ trovi sufiĉe trafajn argumentojn kontraŭ la propono de la „peresperantanoj“. *(Finota.)*

F. Ellersiek.

*) Mi faris la resumon pri jam konataj faktoj, por memorigi la legantojn pri tio, ke la ekzistado de internacia organizaĵo efektive estas forta kaj konstante esprimita deziro de la plejmulto de la esperantistaro. *Ek.*

**) La artikoloj ĵus aperis kiel broŝuro sub la titolo „Kiel nin organizi?“ Vidu la bibliografian parton de tiu ĉi numero. *Red.*

*) S-ro Hodler pardonu al mi ĉi tiun esprimon, kiun mi ĉerpis el lia broŝuro. *Ek.*

Ein bedeutender Erfolg in der praktischen Verwendung des Esperanto.

(Nachdruck nur mit Genehmigung des „Sächs. Landesverband Esperanto“ gestattet.)

Mit Genugtuung und Freude haben wir die Verbreitung des Esperanto innerhalb des *Roten Kreuzes* verschiedener Länder beobachtet.

Diese Entwicklung verdanken wir in erster Linie den unermüdlichen Bestrebungen des Leutnants Bayol an der Kriegsschule von St. Cyr in Frankreich.

Dessen Buch „Esperanto und das Rote Kreuz“ ist in verschiedene Sprachen übersetzt worden und hat somit die Idee in mehreren Ländern verbreiten können.

Als erste sichtbare Erfolge sind die Uebungen esperantokundiger Kolonnen vom Roten Kreuz anlässlich der internationalen Esperanto-Kongresse zu verzeichnen. Die Uebungen geschahen 1908 in Dresden unter der Leitung des Generalmajors Schmidt, 1909 in Barcelona (wobei mehrere hundert Personen an der Uebung teilnahmen und auch die Kolonnen in voller Feldausrüstung mit Feldbaracken, Transportwagen usw. übten) unter der Leitung des Generals Prion-Paris, 1911 in Dresden, anlässlich des Vorkongresses, 1911 in Antwerpen unter Leitung des Belgischen Roten Kreuzes.

Esperantokundige Pfleger und Angehörige des Roten Kreuzes sind inzwischen ebenfalls in mehreren anderen Städten ausgebildet worden und haben sich zu Esperantogruppen zusammengeschlossen, unter denen die Dresdner Esperantogruppe des Roten Kreuzes einen Ehrenplatz einnimmt. Vorsitzender ist Herr F. Grallert in Dresden, dem es auch gelungen ist, Herrn Generalmajor Schmidt, Mitglied des Vorstandes vom Sächsischen Landesverein vom Roten Kreuz, für unsere Sache zu gewinnen.

Wir schulden Herrn Generalmajor Schmidt für sein öfteres Eintreten für Esperanto den grössten Dank.

Als einen neuerlichen Beweis seiner Fürsprache dürfen wir es auch betrachten, dass Esperanto nunmehr auch in der Praxis für das Rote Kreuz eine Rolle spielt.

Der untenstehende Erlass, der an über hundert Rote-Kreuz-Kolonnen versandt wurde, benötigt wohl kaum einer näheren Erläuterung.

K. von Frenckell,
geschäftsf. Vors. d. Sächs. Landesverb. Esp.

* * *

Der Erlass.

Dresden.

An
die Freiwilligen Sanitätskolonnen vom Roten Kreuz
im Königreich Sachsen.

Das Zentralkomitee der Deutschen Vereine vom Roten Kreuz hat für den Fall des Bedarfs in Aussicht genommen, zur Unterstützung der türkischen Gesellschaft vom „Roten Halbmond" eine Hilfsexpedition, bestehend aus Aerzten und Mannschaften der freiwilligen Krankenpflege, nach dem Kriegsschauplatz zu entsenden. Das Direktorium fragt hierdurch an, welche von den aktiven Mitgliedern der Kolonne sich hierfür zur Verfügung stellen. In Frage kommen nur Mitglieder im Alter von ca. 25 bis 40 Jahren, die militärdienstfrei, unverheiratet und vollkommen rüstig sind; erwünscht ist die Kenntnis fremder Sprachen, insbesondere der französischen und der Esperanto-Hilfssprache.

Die Gebührnisse werden voraussichtlich 4 M. für den Tag nebst freier Fahrt, Unterkunft, Verpflegung und Dienstbekleidung betragen.

Dem Eingang der Antwort auf beifolgender Postkarte wird bis zum 20. d. M. entgegengesehen.

Das Direktorium des Landesvereins
vom Rothen Kreuz im Königreich Sachsen.
Der Vorsitzende:
(gez.) *D. Graf Vitzthum,*
Wirklicher Geheimer Rat.

---

8. Universala Kongreso de Esperanto.

Krakovo 11—18 Aŭgusto 1912.

Invitante la Jubilean Kongreson en nian urbon, ni Krakovanoj neniam estus supozintaj, ke iam ni estos devigitaj defendi la famon de nia antikva metropolo kontraŭ iaj malpravaj kaj senbazaj antaŭjuĝoj. Ni ricevas el Germanujo leterojn, kies aŭtoroj avizas nin, ke la germanaj samideanoj malfavore rilatas al nia Kongreso, ĉar ili hezitas veni Krakovon, kiun oni konsideras „malhela angulo de Galicio" aŭ „nekultura nesto" k. s. Al tiuj esperantistoj mi nur povas respondi, ke ili vivas en evidenta malkonsento kun la plej elementaj scioj pri geografio kaj etnografio.

Krakovo, unu el la plej malnovaj urboj en Eŭropo, posedas tiel antikvan kaj originalan kulturon, ke ĝi prave estas nomata „pola Romo". Urbo, en kies muzeoj oni trovas majstroverkojn de Rafaelo, Leonardo da Vinci, Correggio ktp. povas esti nur de malinteligentuloj konsiderata kiel „nekultura nesto".

Fidinda, ĉar oficiala statistiko elmontras, ke la turista movado en nia urbo estas tre forta kaj konstante kreskas. Ĉu tiu fakto estus ebla, se Krakovo ne posedus purajn kaj komfortajn hotelojn, privatajn loĝejojn, restoraciojn, kafejojn kaj aliajn ejojn, kies destino estas ebligi kaj agrabligi al fremduloj la restadon en la urbo?

Vere mi iom hontas, ke mi estas devigita instrui geografion al homoj, kiuj pretendas esti inteligentaj. Ili do sciu, ke Krakovo estas „eŭropa" urbo, kies aranĝoj, rilatantaj la materialan kaj la intelektan vivon de la loĝantaro, staras sur tiel alta nivelo, ke pli ol unu t. n. „okcident-eŭropa" urbo povus ĝin envii kaj imiti.

La estimataj legantoj de „*Germana Esperantisto*" bonvolu pardoni al mi tiun „lecionon pri geografio", sed mi konsideras ĝin necesa, por ĝustigi malpravajn kaj ofendajn opiniojn pri la urbo de la proksima kongreso.

Suspektante tamen, ke en tiaj antaŭjuĝoj kaŝiĝas io pli, ol nur ignorado de geografio, mi firme esperas, ke la germanaj samideanoj ne volas transporti sur la neŭtralan kaj senpolitikan teritorion de kongresoj esperantistaj iajn politikajn antaŭjuĝojn.*) — —

Nun iom pri la kongreso mem, kiu dank' al multaj artikoloj, aperigitaj de la Komitato en la loka ĵurnalaro, elvokis ĉe nia publiko nesupozeble grandan intereson. Sufiĉas diri, ke okazas nun en Krakovo 17 kursoj de nia lingvo. Interalie lernas Esperanton la tuta oficistaro de la Krakova Komerca Ĉambro, kiu intencas prepari por komercistoj, venontaj al la Kongreso, specialan akcepton. Ni citu ankoraŭ specialajn kursojn por poŝtoficistoj, por fervojaj oficistoj, por policanoj (15 ekstreme diligentaj partoprenantoj), por fervojkonduktoroj ktp.

Al la Labora Komitato apartenas multaj influriĉaj kaj gravaj personoj, inter ili 8 urbaj konsilantoj, kiuj ne nur morale subtenas la Organizan Komitaton, sed per reala kunlaboro helpas ĝin en ĝiaj klopodoj.

Por plifaciligi al multaj kongresanoj la pagadon, la Komitato malfermigis al si konton en la imp. reĝa aŭstria Poŝta Ŝparkaso. La numero de la koncerna konto estas 83 173. Tiu aranĝo faciligos la pagadon precipe al germanaj samideanoj, ĉar tiuj, kiuj posedas ĉekkontojn en la imp. germana poŝta Administracio kaj en la reĝa bavara poŝta Administracio povas pagi al la Organiza Komitato per simpla transportado el sia konto en la konton de tiu ĉi Komitato. Tiaspeca

*) Ni bone komprenas la konjekton de nia ŝatata kunlaboranto. Sed ĉu li ne iom trograndigas? Ni ne povas kredi, ke entute la germanaj *samideanoj* havas malamikan opinion pri la teritorio de la 8a Kongreso pro politikaj kaŭzoj. Tiajn sentojn veraj esperantistoj ne esprimas, sed ili laŭeble klopodas eviti la tuŝon de politikaj aferoj. Kaj ĉu ne estas necesa kaj honora devo, ke la nunjara kongreso okazu en pollingva regino? Krom tio, ĉu la slavoj ne havas la saman rajton en Esperantujo kiel la germanoj kaj romanoj? Tion oni bonvolu konsideri kaj ne malfaciligi la laborojn de la Kongresa Komitato per maljustaj antaŭjuĝoj. *Red.*

asigno devas okazi per ĉeko. La necesan klaŭzon sur tia asigna ĉeko oni enskribu en tia formo:

„Asignota al poŝta ĉekkonto N-ro 83 173 de Kongreso Esperantista en Krakovo, ĉe la poŝta ĉekoficejo en . . ."

En unu el la antaŭaj artikoloj mi skribis, ke la kongresa karto N-ro 1 estos aŭkcie vendata. Efektive unu el konataj anglaj samideanoj oferas por ĝi jam 12 Sm. Kiu donos pli multe?

Pri la albumo de kongresanoj la legantoj trovos en tiu ĉi numero apartan noton. La koncerna projekto estas tiel grava, ke oni ĝin nepre devas realigi. Mi ne dubas, ke ĉiuj kongresanoj senescepte aprobos la ideon de la Komitato kaj helpos al ĝia efektivigo.

Sufiĉe multaj personoj aliĝis provizore. Tiuj samideanoj estas insiste petataj sendi la kongresan pagon ĝis la 1a de Majo, ĉar post tiu templimo ili estos forstrekitaj kaj perdos la rezervitan ordan numeron.

Napoleono.

* * *

Albumo de la kongresanoj.

La escepte solena karaktero de la Oka Kongreso postulas, ke ĝi havigu al la partoprenintoj daŭran memoraĵon. Pro tio la Komitato decidis donaci al ĉiu kongresano artan, bronzan medalon.

Nun montriĝis necesa nova aranĝo, kies mankon oni kun bedaŭro sentis ĉe la ĝisnunaj kongresoj. — Ni celas albumon de la kongresanoj.

S-ro Gargul, profesia fotografisto kaj samtempe fervora esperantisto, prenis sur sin la taskon, realigi projekton de la Komitato, koncerne la eldonon de kongresa albumo. — La albumo estos eldonata nur tiam, se almenaŭ 500 kongresanoj ĝin mendos, sed ĝi enhavos portretojn de ĉiuj kongresanoj senescepte. — La bildoj, kiuj estos faritaj laŭ fotohemia procedo, sekve laŭ procedo sole garantianta tre precizajn reproduktaĵojn, estos aranĝitaj tiamaniere, ke ĉiumomente oni povos trovi en la albumo portreton de kongresano, kiun oni konas laŭ lia nomo, aŭ inverse, nomon kaj adreson de kongresano, kiun oni konas laŭ lia aspekto.

Estas nepre necese donaci al nia Majstro albumon de samideanoj, venintaj al la Kongreso el ĉiuj mondpartoj, por honori lin kaj lian grandan verkon. — Tion ĉiu kongresano devas kompreni kaj atenti.

Pro tio ni turnas nin al ĉiuj aliĝintoj kaj aliĝontoj, ke ili sendu al ni sian fotografaĵon nepre en vizit-formato, bone faritan.

Tiuj kongresanoj, kiuj intencas aĉeti la albumon — kaj ni firme esperas, ke neniu hezitos oferi por tiu ĉi celo kelkajn spesmilojn — sendante sian portreton, mendu samtempe la albumon, aldonante antaŭpagon de Sm 2,—.

Se 500 personoj mendos la albumon, ĝia prezo estos Sm 5,—. Ju pli multaj kongresanoj mendos la albumon, des pli malalta estos ĝia prezo.

Ni firme fidas la solidarecon de la kongresanoj kaj petas: Aliĝintoj kaj aliĝantoj sendu senprokraste vian fotografaĵon kaj mendu la albumon.

Loka Organiza Komitato.

Germana Kroniko

Ĉiuj grupoj kaj izolitaj samideanoj estas petataj, sendi al ni kiel eble plej akurate mallongajn raportojn pri sia agado kaj pri la progresoj de Esperanto en sia urbo aŭ regiono. La raportoj devas alveni ne pli malfrue ol la 25an de ĉiu monato.

Gravaj novaĵoj. En la saksa parlamento la deputato S-ro Dro Steche antaŭ ne longe postulis la enkondukon de la deviga instruado de Esperanto en la altajn lernejojn. Plue postulos alia deputato, okaze de la debato pri la leĝo pri popollernejoj, la enkondukon de la laŭvola instruado de Esperanto en popollernejojn. Ŝajnas do, ke la saksa parlamento serioze okupiĝos pri la Esperanto-demando en la lernejoj. Oni bone atentu ĉi tiun gravan fakton. — Alia sukceso estas, ke la reĝa saksa ŝtatministerio por internaj aferoj konsentis pri oficialaj Esperanto-stenografiaj kursoj, aranĝotaj de la Reĝa Stenografia Oficejo en Dresden. La kotizo por partopreno en la kursoj estas pagota al la ŝtatkaso.

*

Bavara Ligo. La 16an kaj 17an de Marto okazis la kunveno de la ligo. La 16an estis aranĝata granda propaganda kunveno, la 17an la konferenco de la ligo. Detaloj pri la kunveno sekvos en la venonta numero.

Saksa Ligo. La 25an de Febr. okazis en Zittau la kunveno de la ligo. La estraro estas unuvoĉe reelektita. Kiel kunvenejon por la IXa kunsido de la ligo oni elektis Frankenberg i. Sa. Post la oficiala kunsido, S-ro Dro Linse el Reichenbach faris publikan paroladon, kiu estis bone vizitata. — Vespere unuiĝis festeto la esperantistojn el Zittau kaj la gastojn. Diversaj paroladoj, kantoj kaj la teatraĵo *La glavo de Damokles* estis prezentataj.

Esperanto - Centro por Studentoj. Dum la lastaj jaroj Esperanto trovis multajn interesulojn inter la germana studentaro. Al la Esperanto-Centro por Studentoj nun apartenas sekcioj aŭ grupoj en jenaj lokoj: Berlin, Braunschweig, Charlottenburg, Dresden, Göttingen Königsberg, München, Rostock. En ĉiu el tiuj ĉi grupoj kaj sekcioj nun okazas kurso. Ankaŭ en aliaj lokoj, ekz. en Aachen, Bonn, Danzig, Halle a. S., Heidelberg, Kiel, Leipzig, Münster, Strassburg i. E. kaj Stuttgart troviĝas esperantistaj studentoj, kiuj penadas veki intereson por Esperanto en siaj rondoj.

*

Auerbach i. V. Dank' al la vigla laboro de S-ro Hugo Gerisch, kiu propagandis nian lingvon en tuta Vogtlando, fondiĝis en Auerbach *Societo Esperanto*, kiu aliĝis al Saksa Ligo kaj G. E. A. Estraro: Prez. S-ro Prof. Nestler, vicprez. S-ro poŝtinspektoro Sennewald, Ia sekr. S-ro fabrikposedanto Hugo Gerisch, IIa sekr. S-ro fabrikposedanto P. Hasenclever, Ia kas. S-ro fabrikdirektoro W. Engelhardt, IIa kas. S-ro komercisto Paul Langhof jr. Komitatanoj fariĝis S-roj redaktoro Bohnenberg, supera instruisto de la reallernejo Gemeseus, bankestro Nauck, bankestro Seemann, fabrikposedanto Alfred

Strössner kaj Arthur Wolff. La societo celas la disvastigon de Esperanto tra tuta Vogtlando per aranĝado de kunvenoj, kursoj, paroladoj kaj per aperigo de artikoloj en ĉiutagaj gazetoj. En *Auerbacher Zeitung* nun aperas ĉiusabate „Esperanto-Ecke". — La 16an de Majo (Ĉieliro) la nove fondita societo aranĝos propagandan kunvenon de ĉiuj Vogtlandaj amikoj de nia afero en imperiestra kastelo Mylau. Estos aranĝata esperanta ekspozicio. Oratoro estos S-ro Dro Otto Linse el Reichenbach i. V. La plej multaj el la Vogtlandaj gazetoj jam nun anoncas la feston. Por aperigo de tiaj artikoloj la Societo organizis specialan komitaton. En tuta Vogtlando regas vigla intereso pri Esperanto, tial oni atendas sufiĉe grandan sukceson de la komuna kunveno. Por partopreno ĉiuj samideanoj estas kore invititaj. — En la jenaj lokoj de Vogtlando nuntempe okazas kursoj: Auerbach, Rodewisch, Lengenfeld, Netzschkau, Mylau, Treuen, Reichenbach, Schöneck, Schönheide, Plauen, Bad Elster.

Augsburg. *Societo Esperanto* malfermis bone vizititan kurson. — Artikoloj pri Esperanto aperis en *Neue Augsburger Zeitung*, *Abendzeitung* kaj *Neueste Nachrichten*. — Esperantaj ĵurnaloj estas regule elmetataj en la jenaj restoracioj: hotelo *Kaiserhof*, kafejo *Kernstock*, *Katolika Kasino*, vegetaria restoracio *Ceres*, hotelo *Bayrischer Hof* kaj en la legoĉambro de la urba biblioteko.

Bamberg. En la ekzamensalonego de la supera poŝtdirekcio okazis la 18an de Marto parolado pri Esperanto. Oratoro: S-ro reĝa poŝtinspektoro Reeber. Inter la multnombre aperintaj geoficistoj estis S-ro reĝa supera poŝtdirektoro Altmann, kiu post la fino de la interesa parolado esprimis al la parolinto sian simpation por nia lingvo. — En kafejo *Schönlein*, *Lieb's Hotel National* kaj restoracio *Schloss Altenburg* estas regule elmetataj esperantaj gazetoj. — *Esperanto - Unuiĝo* elektis en sia ĉefkunveno la jenan estraron: S-ro reĝa librotenisto Hiller (prez. kaj kas.), S-ro jurpraktikanto Loy (sekr. kaj bibl.). Konsilantaro: F-ino Hamberger, S-roj Reeber, Goes kaj Günther. La kurso, gvidata de S-ro Loy, finiĝis, kurso por progresuloj komenciĝis.

Berlin. La lasta komuna kunveno de *Esperanto-Gruparo*, okazinta la 5an de Marto, estis vizitata de pli ol 100 personoj. Kiel gasto ĉeestis S-ro Seyfarth el Maria Enzersdorf apud Wien. S-roj Tarnow kaj Fromm interese parolis pri la organizo de U. E. A. Multe aplaŭdata estis la belega violonludo de S-ro Kwiatkowski, kiu promesis pluajn prezentaĵojn por la venontaj komunaj vesperoj. — *Katolika Societo* komencis, la 9an de Marto, sian unuan kurson por katolikaj gesinjoroj en *Kellers Neue Philharmonie*, Köpenickerstr. 96. Gvidanto estas S-ro Fritz Kleiner. — *Esperanto-Sekcio de Freie Studentenschaft* aranĝis en la lasta duonjaro paroladon pri internaciaj studentaj unuiĝoj. La grupanoj kelkafoje faris referatojn, post kiuj la progresintoj havis okazon, diskutante uzi Esperanton. Du kursoj por komencantoj estas aranĝitaj.

Berlin - Charlottenburg. Dimanĉon, la 3an de Marto, la grupo aranĝis ekskurson al Zehlendorf. Partoprenis 23 personoj, inter kiuj estis esperantistoj el Berlin kaj Potsdam. — En la *Esperanta Sekcio de Freie Studentenschaft* S-ro Fromm parolis pri „Esperanto en la jaro 1911".

Berlin-Neukölln. La sukceso de propaganda parolado en la perfektiga lernejo por virinoj estas nova kurso. Kursgvidanto estas S-ro instruisto Dombrowski.

Bitterfeld. La 16an de Marto la grupo aranĝis esperantan feston. Ĉeestis multaj gesamideanoj el Delitzsch, Dessau kaj Halle. Inter diversaj aliaj deklamoj kaj dancoj estis prezentata la unuakta komedio *Rozalio*.

Bochum. La grupo *Progreso* malfermis kurson por komencantoj; 23 partoprenantoj. Gvidanto: S-ro R. Strack, Delegito de U. E. A. La kunvenoj de la grupo nun okazas en restoracio Lickfeld, Augustastrasse 1.

Braunschweig. La grupo aranĝis ekspozicion en sia kunvenejo. Ĉiulandaj gazetoj, lernolibroj, vortaroj, gvidlibroj, prospektoj k. t. p. estis montrataj. Vespere S-ro supera distriktjuĝisto Reinking faris propagandan paroladon. La multnombre ĉeestantaj neesperantistoj parte anoncis sin por nova kurso, sed ankaŭ la aliaj estas gajnitaj kiel interesuloj. *Braunschweigische Landeszeitung* sendis al la ekspozicio redaktoron, kiu detale kaj favore raportis pri la aranĝo. — En la vintra duonjaro 1911/12 fondiĝis *Esperanto-Grupo de Freie Studentenschaft de la politeknika lernejo*. Per disdono de flugfolioj kaj per malgranda artikolo en la studenta poŝlibro S-ro cand. ing. Jasper sukcesis interesi kelkajn sinjorojn, kiuj partoprenas kurson gvidatan de S-ro Jasper.

Bremen. Laŭ invito de *„Diskutier-Club" de la komerca unuiĝo Union*, S-ro W. Fricke propagande parolis en ties kunveno la 5an de Marto. Vigla aplaŭdo rekompencis lin.

Bromberg. La esperanta movado vigle progresas. Du unuiĝoj petis paroladon pri nia afero. S-ro Szymanowski parolis en *Asocio de Militistaj Aspirantoj*. Kurso kun 21 partoprenantoj komenciĝis. Gvidanto estas S-ro Szymanowski. Krome li parolis en la distrikta kunveno de bontemplanoj. Ambaŭ paroladoj estis bone vizitataj.

Chemnitz. Societo *Antaŭen ĝis la venko* aranĝis printempan feston, kiun partoprenis, krom la membroj de la societo, reprezentantoj de la Chemnitz'a ligo kaj multaj amikoj de nia afero. Deklamoj, kantoj kaj muzikaĵoj plibeligis la feston; dancado unuigis la partoprenantojn ĝis mateno.

Danzig. La 25an de Febr. la grupo aranĝis grandan karnavalfeston. Kiel ĉiujare, la aerveturanto Oberüber vizitis la feston kun sia granda aviadilo. Humorplene li raportis pri la okazintaĵoj de la pasinta jaro. Post prologo, verkita de S-ro Prof. Schultz kaj parolita de F-ino A. Gerecke, estis ludata la komedieto *Perfekta kuiristino*. Kantoj kaj muzikaĵoj, vere arte prezentataj, ĝojigis la ĉeestantojn. F-ino Margarete Staegemann amuzis la aŭskultantaron per deklamo de la prologo *Ŝi ne legos ĝin*, kiun sekvis germana teatraĵo *Tante Malchen* (onklino Amalinjo). Per ĝismatena dancado finiĝis la bela festo. Kelkaj novaj gesamideanoj estas per ĝi gajnitaj por nia afero. — La 8an de Marto okazis la unua legado de la germana dramo *Eberhard Ferber*, kiu estos ludata dum la 7a Germana Kongreso en Danzig-Zoppot. La dramo montras la vivon en la urbo Danzig komence de la 16a jarcento.

Delitzsch. Nova kurso, gvidata de S-ro supera instruisto Schmiedeberg.

Dresden. En la februara kunveno de *Societo Esperanto* S-ro Karsch parolis pri „La praktika uzado de Esperanto en la nuna tempo“ kaj pri U. E. A. Multaj el la ĉeestantoj anoncis sian aliĝon al U. E. A., kiu en Dresden nun havas 100 membrojn. — La listo de la firmoj, ĉe kiuj estas parolata kaj korespondata Esperanto, enhavas jam pli ol 170 nomoj. Preskaŭ ĉiuj profesioj kaj fakoj estas prezentataj en la listo. Sed precipe rimarkinde estas, ke inter ili troviĝas 3 fakoj de la ĉefpolico, 19 distriktaj policejoj, kaj 3 poŝtoficoj. — Por interesi ĉiujn societajn rondojn pri Esperanto, la Dresdenaj esperantistoj aranĝos de tempo al tempo posttagmezajn te-kunvenojn, dum kiuj okazos prezentadoj de artistoj, koncernantaj Esperanton. — La unua esperanta junulara unuiĝo *En juneco nia espero*, kiu konsistas el popollernejanoj, festos la 10an de Aprilo en *Hollacks Etablissement*, Königsbrückerstr. 10, sian unuan fondiĝfeston. Por partopreno ĉiuj samideanoj estas kore invititaj. La programo estos tre riĉa. Certe estas atentinde por la Esperanta afero, ke geknaboj, popollernejanoj, aranĝas esperantan feston.

Durlach. En *Durlacher Wochenblatt* de tempo al tempo aperas artikoloj, kiuj rilatas al Esperanto.

Elberfeld. Grupo *Verda Stelo* fermis la lastan kurson per bela festo. Du novaj kursoj komenciĝis.

Elversberg. La 10an de Marto estis tie la grupanoj el St. Ingbert, por fari propagandon. La sukceso estis bona. Post kelka tempo la grupo de St. Ingbert okazigos en Elversberg grandan publikan kunvenon kun parolado de S-ro Omlor.

Ems. Sukcesplenan propagandan paroladon faris en *Literarischer Verein* S-ro supera instruisto Heinr. Lenk, kiu ĝis nun estas la sola esperantisto de la urbo. Multe da akademianoj, ĝis nun skeptikaj, estas konvertitaj per la konvinka kaj entuziasma parolado.

Eutin. En la jarkunveno de la grupo la estraro estis reelektata. — La direkcio de *„Technikum“* decidis, meti en la instruprogramon por la venonta somera duonjaro la laŭvolan instruon de Esperanto. — La grupo ankaŭ interrilatis kun la *Komerca Unuiĝo de 1858* pro instruo de Esperanto.

Flensburg. La 6an de Marto *Flensburga Esperanto-grupo Espero* estis fondata. Estraro: S-ro Dro Fischer kaj F-ino Piepgras (prez.), S-ro Schäning kaj S-ino Blümcke (sekr.), F-ino Lorenzen (kas.). La grupo havas 25 ordinarajn membrojn. Post parolado de S-ro Dro Fischer en la *Instruista Unuiĝo*, ĉiuj dudek ĉeestintoj aliĝis al la nova grupo kiel eksterordinaraj membroj. Kunvenoj: la unuan kaj trian merkredon de ĉiu monato en *Hotel Union*.

Frankfurt a. M. La jarkunveno de la *Esperanto-Grupo* okazis la 1an de Marto. La estraro nun estas: S-roj E. Hummel (prez.), C. Barthel (vicprez.), H. Fricke (kas.), Rob. Kreutz (sekr.), J. Kehl (bibl.). Kunsidantoj estas S-roj Berger, Heinz, Wischoff. — Novaj kursoj komenciĝis: en la grupa kunvenejo kun 15 partoprenantoj, en Frankfurt-Niederrad kun 12 lernantoj (ambaŭ gvidataj de S-ro Hummel); en „Lernejo por modernaj lingvoj“ kun 10 partoprenantoj (S-ro Kreutz). La 22an de Marto la grupo aranĝis lumbildan paroladon de S-ro Wichert-Charlottenburg pri la lasta kongreso en Antwerpen kaj pri la venontaj en Danzig-Zoppot kaj Krakovo.

Fürth. La 17an de Febr. la grupo aranĝis karnavalfesteton, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 80 personoj.

Godesberg a. Rh. La 29an de Febr. *Godea* aranĝis ekzamenon laŭ la regularo de G. E. A. La ateston pri lernado ricevis F-inoj Dreesbach, von Schmid, Harprath, Aelten kaj S-ro Bauer. Ekzamenantoj estis S-ro Butin kaj Daum. — La 18an de Marto okazis la jara ĉefkunveno de la grupo. La Godesberg'aj kaj Bonn'aj gazetoj detale raportis pri la ĉefkunveno. — La kursoj multe progresigis la partoprenantojn, tial la grupo nun havas multajn membrojn, kiuj bone scias la lingvon. — Oficejo de *Godea* estas ĉe: S-ino Dreesbach, Bahnhofstr. 30; prezidanto: S-ro Arntz, vicprez.: S-ro Müller, sekretarioj: S-roj Oster kaj Dahmann, kasistinoj: S-ino kaj F-ino Dreesbach, bibliotekistino: F-ino von Schmid, revizoro de la kaso: F-ino von Schmid, kursgvidantoj: S-roj Arntz, Bauer kaj Müller. Delegitoj de U. E. A.: S-ro Oster, gesinjoroj Marx. Krom tio la grupo organizis propagandan sekcion kun diversaj subsekcioj; interalie por gazetaro, Esperanto-literaturo, komerco, propagando en lernejoj kaj inter la oficistaro, informejoj pri lingvaj, religiaj, sciencaj kaj artaj demandoj k. t. p.

Grossschönau i. Sa. *Grupo Espero* festis dimanĉon, la 10an de Marto, la 2an datrevenon de sia fondiĝo. Pli ol 150 personoj ĉeestis, inter ili delegitoj de la najbaraj grupoj Teichstadt, Schönlinde, Rumburg, Ober- kaj Niedergrund, Warnsdorf, Zittau, Waltersdorf kaj Seifhennersdorf. Okazis diversaj amuzaĵoj, teatraĵoj kaj dancado.

Halle a. S. S-ro inĝeniero Knoff faris Esperantan paroladon, kiu frazo post frazo estis tradukata germanen. Montrante memfaritajn de li lumbildojn, li parolis pri sia vojaĝo tra la insulo Rügen kaj tra Danujo. S-ro supera instruisto Schmiedeberg el Delitzsch diris kelkajn klarigajn vortojn pri Esperanto. Sukceso: 30 personoj anoncis sin por kurso, la plej multaj el ili tuj aliĝis al la grupo.

Hamburg. La 2an de Marto kunvenis la partoprenintoj de la du specialaj kursoj por subaj poŝtoficistoj. Fondiĝis grupo, nomita: *Poŝt-Esperantista Unuiĝo* (Post-Esperantisten-Vereinigung). Oni decidis aliĝi al *Deutsche Post- und Telegraphenbeamten-Vereinigung für Esperanto* kaj al *Ortsverband Hamburg-Altonaer Esperantogruppen*. Kunvenoj: ĉiusabate en restoracio de John Möller, Neue A. B. C.-Str. 12c. Estraro: S-roj Ernst Frank (prez.), Wilh. Lauer (vicprez.), Fr. Gries (kas.), Emil Bredemeier (sekr.). Oficejo: S-ro Ernst Frank, Grindelallee 54, H. III. S-ro Wilh. Lauer dediĉis al la nova grupo belan memfaritan standardon. — S-ro Dro Cohen faris interesan paroladon en *Barmbecker Volkshaus* pri internacia helplingvo. — Dum la lasta diskutvespero parolis S-ro Prof. Dro Koeppen pri: „Veterkartoj kaj Veterbultenoj“; vigla diskutado sekvis. — El la partoprenintoj de la kurso por komencantoj sukcese trapasis la ekzamenon: F-ino Niemann, S-ino Rehm, S-roj Berger, Claassen kaj Neumann. — La *Unua Grupo* okazigis la 15an de Febr. sian jaran ĉefkunvenon. La nove elektita estraro konsistas el: S-roj Dro Cohen (prez.), Epstein (vicprez.), S-ino Jenckel (1a sekr.), S-roj Dro Besser (2a sekr.), Hindberg (kas.), Rauch (revizoro), Frank (arĥivisto), S-ino Dro Jaffé, F-ino Haupt kaj S-ro Frederking (biblioteka komisio). S-ino

Jenckel, S-roj Bünemann, Dro Cohen, Epstein, de Ladevèze, Dro Mybs (instrua kaj ekzamena komisio), S-ino Jenckel, S-roj Rauch kaj Dro Cohen (gazetara komisio). — Al *Unuiĝo Progreso* aliĝis dum la monato Februaro ree kelkaj novaj membroj. La kunvenoj ĉiam estas bone vizitataj. S-ro Curdt faris paroladon, kiu trovis multan intereson. — Grupo *Ĉiam antaŭen* ŝanĝis sian nomon en *Hamburg-Altonaer Abstinenten-Esperantisten-Gruppe.* La estraro nun konsistas el S-roj Schön, Ehlers kaj Muxfeld. La oficialaj kunsidoj de nun okazos ĉiudimanĉe antaŭtagmeze de la $10^1/_2$ ĝis la $12^1/_2$ en Logenhaus, Altona, Sommerhuderstr. — S-ro Schön propagande parolis en *Wehrloge*, Altona; 15 personoj anoncis sian partoprenon al kurso. Sub la gvidado de la grupo nun okazas kvar kursoj; ĉiuj estas bone vizitataj. Je la fino de la monato Januaro malfermis S-ro W. Kritsch en Logenhaus Moorkamp novan kurson. — *Societo Verda Stelo* okazigas nuntempe po unu kurso por komencantoj kaj progresintoj; ambaŭ bone sukcesas.

Kassel. En la lasta jarkunveno de la grupo, la 23an de Febr., estis elektata la jena estraro: S-roj Sandrock (prez.), Pötter (vicprez.), Bartholomäus (1a sekr.), Schürg (2a sekr.), F-inoj Schuch (1a kas.), Minke (2a kas.), S-ro Rust (bibl.). La grupo nun nomiĝas *Esperanto-Societo Kassel.* Kunvenoj: ĉiuvendrede vespere je la $8^1/_2$ en *Café Zeppelin*, Hohenzollernstr. 26.

Kattowitz. Dank' al la klopodoj de S-ro supera instruisto Knopf, kiu jam dum la lasta vintro gvidis kurson, fondiĝis grupo, kiu aliĝis al G. E. A. Bedaŭrinde S-ro Knopf forlasos la urbon la 1an de Aprilo. Estraro de la grupo estas: S-ro Jelinski (prez.), F-inoj Frieda Wohlbrück (sekr.), Käthe Wohlbrück (kas.) kaj S-ro Ryschka (bibl.). — Novan kurson kun 15 partoprenantoj gvidas S-ro Skutnik. Oficejo: S-ro Jelinski, arhitekt-inĝeniero, Wilhelmplatz.

Kiel. S-ro Clementsen, membro de *Esperanto Grupo* faris diversajn propagandajn paroladojn: en la loka grupo de *Deutscher Monistenbund*, en *Gesellschaftshaus junger Kaufleute* kaj en *Schutzmannsverein.* La 28an de Januaro fondis du membroj de la grupo, S-roj Lage kaj Lammers, la *Esperanto-Jugendgruppe*, al kiu aliĝis 8 reallernejanoj. Prezidanto estas S-ro Lammers, sekretario S-ro Lage, Sophienblatt 66. La nova grupo aliĝis al Germana Ligo de Junaj Esperantistoj. — La 30an kaj 31an de Januaro komenciĝis du kursoj por policanoj, gvidataj de S-roj Dicks kaj Wohlstadt. La kursoj okazas en la instrua ĉambro de la reĝa polica prezidejo. Partoprenas 18 policanoj kaj 8 aliaj personoj.

Kirchheim. Post anoncado kaj atentigo en la tiea gazeto *Der Teckbote*, S-ro Prof. P. Christaller el Stuttgart faris propagandan paroladon. Raportante pri siaj travivaĵoj dum la diversaj Esperantaj kongresoj, li klarigis al la multnombre aperinta aŭskultantaro la utilon kaj necesecon de internacia lingvo kaj montris la taŭgecon de Esperanto. 20 personoj tuj anoncis sin por kurso. *Der Teckbote* detale kaj favore raportis pri la parolado kaj atentigis pri la komencota kurso.

Königsberg. *Esperanto-Sekcio de Freie Studentenschaft de la Universitato*, kiu fondiĝis dum la somero 1910, bone progresas. S-ro stud. med. Chason gvidas la kurson por komencantoj. Promenoj kaj mallongaj ekskursoj estas uzataj por interparoloj. Per disdono de flugfolioj kaj paroladoj la sekcio faris efikan propagandon.

Kronenberg. La kurson, aranĝitan de la grupo *Verda Stelo*, partoprenas 25 gelernantoj. Gvidanto: S-ro instruisto Wolfertz.

Lauban. *Esperanto-Societo* aranĝis dimanĉon, la 3an de Marto, amuzan kunvenon. Kelkaj anoj de la societo plibeligis la festeton per prezentado de muzikaĵoj, esperantaj kantoj kaj teatraĵo. Inter la ĉirkaŭ 200 ĉeestantoj estis kelkaj samideanoj el Görlitz. — S-ro Lutteroth, prezidanto de la gimnaziana Esperanto-grupo, gajnis premion en konkurso de la franca gazeto *Journal d'Allemagne.* Li vojaĝas Parizon dum la paska libertempo, en karavano de 50 germanaj gimnazianoj premiitaj. Li intencas tie viziti esperantistojn kaj, interparolante kun ili, propagandi nian lingvon inter siaj kunvojaĝantoj. — La 23an de Marto okazis ĉefkunveno de *Unuiĝo de Laŭbanaj Gimnazianoj.* Estraro: S-roj Lutteroth (prez:), Herttrich (sekr. kaj kas.). La ĝisnuna sekretario, S-ro Schuster bedaŭrinde devis forlasi sian oficon ĉar li eksiĝis el la gimnazio. Oficejo: S-ro Herttrich, Breitestr. 25.

Leipzig. Dum la antaŭpaska foiro, en la stratoj de la urbo ofte estis vidata la fremdlingva aŭ pli bone la lingvojn-scianta policisto. Li estas konigita per kolora rubando, kiun li havas ĉirkaŭ la brako. Krom la franca, angla, hispana kaj rusa lingvoj, li ankaŭ scias Esperanton.

Lübeck. *Societo Esperanto* okazigis la 8an kaj 11an de Febr. sian 3an elementan ekzamenon. El la 16 partoprenintoj apartenas 7 al Societo Esperanto, 6 al la komerca, 2 al la laborista kaj 1 al la teknika grupoj. Ĉiuj ricevis la ateston pri lernado kaj krom tio libropremiojn.

München. *Esperanto-Sekcio de Freie Studentenschaft de la Universitato* aranĝis dum la vintra duonjaro le jenajn paroladojn: pri la Sepa (S-ro Maurer), pri Kalifornio (S-ro Parrish). La grupanoj laboras pri la traduko de la katalogo de *Germana Muzeo* en München. La sekcio havas 11 aktivajn membrojn. — En la sekvantaj restoracioj estas regule elmetataj esperantaj gazetoj: *Peterhof*, kafejo *Bauer*, *Regensburger Hof* kaj vegetaria restoracio *Esperanto.*

Münster i. W. La 5an de Marto okazis la jara ĉefkunveno de la grupo; kelkaj kursanoj aliĝis. Estraro: S-roj H. Braun (prez.), supera leŭtenanto M. Böhm (vicprez.), J. Sahler (kas. kaj sekr.), F-ino C. Brander (bibl.). Oficejo: S-ro J. Sahler, Industriestr. 14 I. Esperantistoj, kiuj travojaĝos la interesan urbon, estas petataj viziti la oficejon. — La grupo tre energie penadas por la disvastigo de Esperanto ne nur en Münster sed ankaŭ en la tuta ĉirkaŭaĵo. (Vidu la raporton pri Osnabrück.)

Offenbach a. M. La grupo nun ekzistas el 10 anoj. — Post propaganda parolado komenciĝis nova kurso kun 8 gepartoprenantoj.

Osnabrück. Dank' al la klopodoj de la grupo el Münster, de nun ankaŭ la tria loka gazeto *Osnabrücker Volkszeitung* publikigas artikolojn pri Esperanto. — La 5an de Marto S-ro F. Driehaus, ano de la *Komerca Unuiĝo de 1858, sekcio Osnabrück*, faris priesperantan paroladon en sia unuiĝo. Per helpo de la grupo el Münster li sukcesis veki inter la ĉeestantoj intereson pri Esperanto. Kelkaj sinjoroj

jam nun anoncis sian partoprenon al kurso dum la venonta aŭtuno.

Pasing b. München. S-ro Strössner el München malfermis kurson post propaganda parolado.

Rostock. Dimanĉon, la 25an de Febr., S-ro Bock, kasisto de la tiea grupo, faris propagandan paroladon en la unuiĝo *Freie Jugend* (Libera Junularo). 40 el la ĉeestintoj partoprenos kurson. — La grupo aranĝis sukcesplenan paroladvesperon en Warnemünde. — La *Esperanto-Sekcio de Freie Studentenschaft,* fondita dum la vintra duonjaro 1911/12, bone progresas.

St. Ingbert. La 10an de Marto la grupo ekskursis al Elversberg, por tie propagandi. Raporton vidu sub Elversberg.

Schwabach. La 16an de Febr. fondiĝis grupo, kiu decidis aliĝi al Bavara Ligo.

Stade. La bontemplanoj aranĝis esperantan kurson, kiun partoprenas 20 sinjoroj. Gvidanto: S-ro instruisto J. Tamke. — S-ro Tamke ankaŭ multe propagandas nian aferon en la tiea seminario.

Strassburg i. Els. S-ro cand. med. Böhringer faris paroladon pri Esperanto en socialscienca sekcio de *Freie Studentenschaft.*

Stuttgart. La loka grupo aranĝis ekspozicieton en la grandaj fenestroj de *Kafejo Esperanto.* Alterne estas elmontrataj flugfolioj, Ĉefeĉaj ŝlosiloj, gazetoj, libroj, poŝtkartoj kaj U. E. A.-aĵoj. Post la malfermo de la ekspozicio por vojaĝo kaj turismo (vidu paĝon 39), ĉesos la elmontro en Kafejo Esperanto. La gazetoj *Württemberger Zeitung* kaj *Neues Tageblatt* atentigis pri la elmontraĵoj.

Weinböhla b. Dresden. La grupo aranĝis bone vizitatan publikan paroladon.

Warnemünde. Esperantogrupo Rostock aranĝis ĉi tie propagandan vesperon. S-roj Bernhöft, Bergmann kaj Bock klopodis per paroladoj, S-ro Wolter per kantoj interesi pri Esperanto la ĉirkaŭ 45 ĉeestantojn. Kurso komenciĝos sub gvidado de S-roj Bergmann kaj Bock. 16 personoj anoncis sian partoprenon. La bonan sukceson de la vespero precipe kaŭzis la persona propagando kaj la senlacaj klopodoj de S-ro Wolter, Warnemünde. Ankaŭ la gazetoj tre favoras nian aferon.

Zittau i. Sa. La 5an de Marto komenciĝis kurso kun 20 partoprenantoj.

A. H.

Pro tro multe da alia grava materialo ni devis ellasi el tiu ĉi numero la rubrikon Gazetaro. *Red.*

Internationale Esperanto-Bewegung

